

Okdek jaroj de esperanta vivo, 9-a parto
Zamenhof kaj la reformoj de esperanto
Claude Gacond, 187-a radioprelego, 1967.05.10 & 1967.05.13

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Subite en 1893 Zamenhof ŝanĝas sian sintenon rilate al la problemoj de la reformoj de esperanto. Ĝis nun li provis komprenigi al la legantoj de *La Esperantisto*, ke la reformismo fontas el subjektivaj vidpunktoj. Aŭdu lin :

A.- « *Ĉiu proponanto pensas, ke lia propono estas ne sole bona, sed eĉ **necesa** por nia lingvo, eĉ **demando de vivo** por ĝi ! Sed kiam mi montras al unu amiko la proponon de alia, mi pleje ricevas la respondon : « Ne, ne ! **tiun** ŝanĝon neniam permesu, ĉar vi malbonigos la lingvon ! »*

Cl.- Nun Zamenhof ekfaras reformo-proponojn, kiuj povus esti **permesataj**, sed **nedevegaj**. La uzado de la malnovaj formoj ĉiam restus bonaj, kaj ili estus forigitaj el la lingvo nur tiam, kiam post longa tempo montriĝus, ke neniu plu ilin uzas.

A.- Tio bone difinas la zamenhofan vidpunkton koncerne al la lingva evoluo. Li konsideras esperanton kiel vivantan lingvon. Li scias, ke iom ĉie en la mondo homoj lernas kaj ekpraktikas ĝin. Eĉ se akademio subite proklamus ŝanĝojn en la lingvo, multaj homoj, kiuj nek abonas la gazeton, kiuj nek legas, sed nur korespondas kun kelkaj amikoj, daŭre uzas la malnovajn formojn.

Cl.- En la sinteno zamenhofa ni divenas ankaŭ ion alian. Por li la konfrontado inter la permesataj reformoj kaj la klasika uzo verŝajne malpravigus la reformojn.

A.- Pro tio li sin riskas proponi la tiom petatan de la rusoj forigon de la artikolo **la**. Li scias, ke la artikolo **la** tamen estas necesa al esperanto, do ke fine ĝi ĉesos esti kritikata eĉ en Ruslando.

Cl.- Por ĉesigi la kritikojn de la kontraŭ-akuzativuloj kaj kontraŭ-pluraluloj Zamenhof proponas, ke la adjektivoj kaj pronomoj povus akcepti la akuzativan kaj pluralan markojn nur tiam, kiam ili starus sen substantivo. Ekzemple oni rajtus diri : *Mi rakontos al vi nova tre interesa historion ; mi venis kun ĉiu mia bona infanoj : donu al mi tiu via bela librojn ; mi amas la honesta homojn ; sed oni devus diri mi amas la honestajn.*

A.- La praktiko de esperanto certe revenigus la malnovajn formojn, kaj eĉ la kontraŭ-akuzativuloj konvinkiĝus pri la neceso de tiu kazo.

Cl.- Alia propono permesus apostrofi la **aŭ**-finiĝon de la **aŭ-vortoj**. Tiam la akcento falus sur la lasta restanta silabo. **Anstataŭ** fariĝus **anstat'**, **hieraŭ** **hier'**. Ni pensas, ke tiu propono korespondas al la spirito de nia lingvo. Pro tio iun tagon ĝi sin eble retrudos, sed per alia vojo.

A.- Tiuj proponoj pri permesoj, anstataŭ kvietigi la spiritojn, akrigis la prilingvajn disputojn. Kaj oni vidis la vidpunktojn ŝanĝiĝi. La personeco de Antoni Grabowski estas tiurilate interesa. Jen homo, kiu havis publike la kuraĝon refuti siajn proprajn proponojn. En *La Esperantisto* oni legas :

Cl.- « *Sinjoro Grabowski, kiu per si mem ĉiam estis por la diritaj ŝanĝoj (li eĉ estis la unua el ĉiuj amikoj, kiu proponis – kvankam ne postulis – la ŝanĝon numero 1) [ŝanĝo de la plurala manrko **j**], en sia lasta vizito ĉe mi diris al mi, ke li nun iom ŝanĝis sian opinion, ĉar, komencinte pli multe uzadi la lingvon parole, li konvinkiĝis, ke la **aj, oj, ajn, ojn** tute ne estas tiel malagrablaj al la orelo, kiel li en la komenco pensis teorie. »*

A.- Richard Geoghegan skribis al Zamenhof :

Okdek jaroj de esperanta vivo, 9-a parto
Zamenhof kaj la reformoj de esperanto
Claude Gacond, 187-a radioprelego, 1967.05.10 & 1967.05.13

Cl.- « *En la tuto, mi nun al kutimiĝis al la sono de la lingvo, ke mi nenion volus ŝanĝi.* »

A.- Rusoj skribis, ke kvankam ili estas slavoj, ili tamen ne povus aprobi la forigon de la artikolo **la**.

Cl.- Kaj sinjoro Trompeter, la mecenato, skribis, ke kvankam li estis por la forigo de la artikolo **la**, poste li ŝanĝis sian opinion.

A.- Sed Trompeter deziris kelkajn aliajn ŝanĝojn. Li malŝatis la konjunkcion **kaj**, kaj estis kontraŭ la sono **s** komence de vortoj. Li komprenigis al Zamenhof, ke lia subvencio ĉesos, se reformo en la lingvo ne okazos. Por li **e** devis anstataŭi **kaj**, kaj anstataŭ diri **sablo, salo, sama, sed, sen**, oni devus diri kaj skribi **zablo, zalo, zama, zed, zen**. Jen subjektivaj detaletoj, kiuj subite devigis Zamenhofon verki precizan reform-proponon kaj ĝin voĉdonigi.

Cl.- La korespondado inter Trompeter kaj Zamenhof bedaŭrinde perdiĝis, sed letero de Zamenhof al la ruso J. Guminski, skribita antaŭ la voĉdona rezulto en 1894, estas tre interesa. Ĝi lumigas la premojn, al kiuj Zamenhof estis submetita. Aŭdu :

A.- « *En la lastaj kelkaj jaroj multaj amikoj komencis postuladi reformojn ; mi petegadis ilin konstante kaj senĉese, ke ili lasu tiun ĉi demandon, kiu alportos nenian utilon kaj nur tute ruinigos nian aferon ; sed neniun volis min aŭdi.*

Cl.- *Mi kreis Ligon por decidi pri tiuj ĉi aferoj, sed ankaŭ tio ĉi ne helpis, ĉar ĝian nesukceson la reformistoj klarigadis per tio, ke mi batalas kontraŭ reformoj.*

A.- *En la fino de la jaro 1893 sinjoro Trompeter sciigis min, ke se mi ne elpaŝos persone kun radikalaj reformoj, li ĉesos eldonadi la gazeton ; ankaŭ la aliaj reformistoj forte agitadis por reformoj.*

Cl.- *Tiam alpremita al la muro kaj vidante nenian helpon, mi vole-ne-vole devis cedi kaj alpaŝi kun propono de radikalaj reformoj. Nun dank'al Dio ĉio baldaŭ estos finita ; ĉiuj esperantistoj pripensis la aferon kaj konvinkiĝis, kiel danĝeraj nun estus ĉiaj reformoj ; nun ni baldaŭ havos oficialan decidon de la plimulto kontraŭ reformoj, - kaj nia afero estos savita kaj ĉiujn niajn fortojn ni povos nun trankvile uzadi por la vastigado de nia afero.* »

A.- Tiu aserto de Zamenhof pruvas, ke ĉu li estis bone informita pri la ĝenerala vidpunkto de la abonantaro de *La Esperantisto*, ĉu li estis verkinta reform-projekton, kiun li antaŭpensis neakceptebla. La konkludo de lia letero estas ankaŭ interesa. Aŭdu :

Cl.- « *Instruita de la maldolĉa sperto, mi uzas nun ĉiujn miajn fortojn, por fari nian aferon finance sendependa de ĉiu aparta persono.* »

A.- Kvankam Zamenhof publike devis proponi reform-projekton, li ĉiam esprimis sian kontraŭstaron al ĉia reformo trudita per voĉdona decido. Kaj en sia korespondado li instigis la esperantistojn voĉdoni kontraŭ la reformo-projekto. Tiurilate jen interesa letero sendita al la Societo Espero en Sankt-Peterburgo :

Cl.- « *Mi havas la honoron sciigi la Societon **Espero**, ke en Majo komenciĝos la tre grava kaj decida komuna voĉdono pri la reformado aŭ nereformado de la lingvo Esperanto. Private mi scias la opinion de **Espero** ; sed bedaŭrinde la opinion de neabonantoj de **La Esperantisto** mi ne havas la rajton akcepti en la nombron de la voĉoj ; tial mi kore petas, ke ĉiu membro de **Espero**, kiu volas havi voĉon en la decida komuna voĉdonado, rapidu aboni **La Esperantiston** ne pli malfrue ol ĝis la fino de Aprilo.*

A.- *Mi kore petas ĉiujn estimatajn membrojn de **Espero** kaj entute niajn San Perterburgajn [tiam zamenhofa formo] amikojn, ke ili ne tenu sin pasive en tiu ĉi voĉdonado, ĉar la nuna*

Okdek jaroj de esperanta vivo, 9-a parto
Zamenhof kaj la reformoj de esperanto
Claude Gacond, 187-a radioprelego, 1967.05.10 & 1967.05.13

voĉdonado estas plej grava kaj decida por la tuta estonto de nia afero kaj pasiva sintenado de unu partio donos pli forton [tiam zamenhofa formo] al la partio kontraŭa. »

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-